

Abonu Pilo-Press nun
por 1975!

Abonkotizo 30,- DM Eldonanto/Herausgeber

40,- DM kun germana eldono!

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 38/1974 - 4 nov 1974
Aperas ĉiusemajne

Kunveno de la ILEI-estraro en Vieno

Vieno (pp/es). De la 2 ĝis 4 novembro 1974 kunvenis la estraro de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) en la Aŭstra Esperanto-Centro. Oni traktis i.a. la okazigon de pliaj lernejaj eksperimentoj en FR Germanio, Belgio, Francio, Italio kaj Aŭstrio. Okaze de intervjuo kun la urba lerneja konsilisto de Vieno montriĝis, ke klasoj de Vienaj elementaj lernejoj povos partopreni en tia lerneja eksperimento dum la lerneja jaro 1975/76. La delegacio de la esperanto-instruistoj, kiu konsistis el reprezentantoj de FR Germanio, Francio, Italio, Svedio, Hungario kaj Aŭstrio, estis akceptita ankaŭ en la federacia ministerio por instruado sub la gvido de rektoro Sonnabend. El la interparoloj rezultiĝis, ke la ministerio rekomendas la partoprenon de Aŭstrio en la koordinita instruado de Esperanto en la cititaj landoj por la tuta lando.

Scienca Akompanantaro

Paderborn (pp) Kiel ni jam informis en numero 37 de Pilo-Press la 19an de oktobro fondiĝis Scienca Konsilantaro aŭ Akompanantaro por Esperantaj lernejaj eksperimentoj. La rondo konsistas el jenaj personoj:

D-ro Aŝvinkumar, Hindio; Prof. D-ro Gyula Decsy, Hamburgo; Prof. D-ro Helmar Frank, Berlin-Paderborn; Instruistino Erzsébet Formaggio, Italio; Prof. D-ro P. Janton, Francio; D-ro H. Kasselmann, Paderborn; D-ro H.-M. Maitzen, Bochum; Prof. D-ro Ivo Lapenna, Londono; R. Markarian, M.A., Shenfield, Britio; S-ino D-ro B. Meder, Paderborn; Prof. H. E. Piepho, Giessen; Prof. D-ro H. Rupperecht, Hannover; Prof. D-ro W. F. Schmid, Flensburg-Siegen; Prof. D-ro I. Szerdahelyi, Budapeŝto; D-ro J. C. Wells, Londono; Prof. L. M. Weeser-Krell, Paderborn; Landrat (distriktestro) Köhler MdL, Paderborn; OStR (gimnazia profesoro) Jürgen Hinrichs (FDP), Bünde; urba direktoro D-ro Löwenberg, Paderborn; S-ino lerneja konsilisto A. Habig, Paderborn; Lerneja konsilisto J. Benistant, Le Mans, Francio.

Rezolucio de la ILUS-laborkonferenco

Paderborn (pp) La ILUS-Laborkonferenco, kiu kunvenis la 18 ĝis 20 okt en Paderborn (vidu PP n-ro 37/74) unuanime akceptis jenan rezolucion:

"La partoprenantoj de la 3a Laborkonferenco de ILUS konstatas, ke ekzistas internacia dualingva problemo en Eŭropo. Per la ĝisnunaj rimedoj ĝi ne estas solvebla. Estas nepre necese, ke la oficialaj kaj similaj eŭropaj rondoj serioze ekstraktu la lingvoproblemon kaj konsideru ankaŭ la eblecon de planlingvo. Ni postulas de la aŭtoritatoj, ke ili laŭeble baldaŭ ekdiskutu tiun problemaron. Nian helpon ni ofertas."

Aldono: Al ĉi tiu numero estas aldonita invito al Esperantista Skiferio en Adelboden, Svislando.

Letero el Brazilo

Bona Espero, Brazilo. Pilo-Press ricevis jenan interesan leteron el Brazilo sub la dato de 30a de oktobro 1974:

"Kvankam ni ne informis vin "oficiale" pri nia translokiĝo al Brazilo, tamen ni supozas, ke vi scias tion. Eble vi opinias, ke ni ne plu ricevis "Pilo-Press", sed male estos interese por vi ekscii, ke ĝuste en Pilo-Press ni legis la unuajn informojn pri la Hamburga U.K. nur kelkajn tagojn post ĝia konkludo! Kiel povis okazi simila miraklo en epoko kiam la italaj poŝtistoj, se ne strikas, libertempas, konsiderante la fakton, ke ni vivas en fora regiono ĉe la limoj de la mondo? Simple ĉar la 12an de aŭgusto vizitis nin amikoj el Torino, kiuj kunportis la ĵus ricevitan kopion de via pres-bulteno!

Ni ne plu povos aktive kunlabori kun vi pri la eŭropaj aferoj, sed eble ni povos sendi de tempo al tempo informojn al vi pri la promes-plena Esperanto-movado en Brazilo kaj precipe pri Bona Espero.

Ja, de tri monatoj ni vivas en tiu ĉi lando kaj partoprenas tiun unikan eksperimenton pri esperantista komunumo sur vasta areo en belega subtropika regiono. Preskaŭ neniu en Eŭropo eksciis pri Bona Espero, sed kiam ni vidis ĝin dum pasinta vojaĝo, ni decidis translokiĝi definitive. Laŭ materia vidpunkto la vivkondiĉoj estas ankoraŭ multe plibonigendaj, sed laŭ spirita vidpunkto ĉi tie ni vere vivas nian esperantistan idealon en frata kaj harmonia etoso.

Nia lernejo estas eble la nura en la mondo kie ĉiutage oni instruas Esperanton, kaj la Internacia lingvo estas vere la dua hejma lingvo (post la portugala) de niaj infanoj.

Nia Esperantujo ampleksas nuntempe ĉ. 14 kvadrataj kilometroj, (preskaŭ dek foje Princlando Monako!), kaj ni havas kvar riverojn, du lagojn, akvofalojn, montojn fruktarojn kaj 34 ĉevalojn: vera edeno precipe por ni eŭropanoj naskitaj sur asfalto, enskatolitaj en niaj poluciitaj urboj kaj avide sopirantaj al Dio Mono!

Baldaŭ ni havos en Bona Espero terkulturan gimnazion, kiu estos la nura por regiono vasta 2000 kvadratajn kilometrojn. Tiel, sub la signo de Esperanto, ni plenumos vere gravan socian taskon por helpi la infanojn kiuj suferas de subevoluinta socio.

Venontan jaron ni sendube partoprenos la U.K. en Kopenhago kaj ni esperas kunporti filmon kaj dokumentajn fotojn pri nia laboro.

Intertempe ni ĝojos ricevi viajn novaĵojn kaj por rapidigi la korespond-liveradon ni havas poŝtkeston en la ĉefurbo:

Caixa Postal 04-0097 - 7000 Brasilia D.F., Brazilo

Akceptu niajn plej korajn kaj amikajn salutojn

Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia "

Andrzej Pettyn en Finnlando

Turku (pp) La konata redaktoro de Pola Radio, Andrzej Pettyn, por 6 semajnoj restadas en Turku, Finnlando, kie li daŭrigas la studadon de la finna lingvo, historio, literaturo kaj kulturo de Finnlando. Li faros ankaŭ prelegojn en Esperanto-klubo. La unua okazas la 6an de novembro en Helsinki. Krome A. Pettyn partoprenos en la organizado de vastskalaj korespondaj kursoj de Esperanto en Finnlando.

Novajoj el Kopenhago

Kopenhago/Rotterdamo. (pp) Jus aperis la 2a Oficiala Komunikilo pri la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago 1975.

Oni povas legi i.a.:

Oficiala flugkompanio estas SAS, kies ĉefsidejo estas en Kopenhago. El detala interkonsento inter la Kongreso kaj SAS estas menciinde jam nun, ke SAS havigos belajn dokumentujojn por ĉiuj kongresanoj. LKK rekomendas al ĉiuj karavan-gvidantoj, kiuj ankoraŭ ne kontraktis kun flugkompanio, turni sin unue al sialanda reprezentanto de SAS.

Kontaktoj ĉe Ministerio

Dum plubtaga vizito al Kopenhago en oktobro, la vicdirektoro de la C.O. de UEA, Simo Milojević, estis akceptita de ambasadoro R. Hansen en la dana ministerio por eksterlandaj aferoj, kune kun la vicprezidanto de LKK, Ejnar Hansen. Estis pridiskutitaj la eblecoj de kunlaboro de la danaj instancoj por Dana Vespero en la kongresa programo kaj de eldono de nova filmo kaj informbroŝuro pri Danlando en Esperanto.

Nova sekretario de la Belartaj Konkursoj

Estas nomita nova sekretario de la Belartaj Konkursoj, kiujn rajtas partopreni ĉiu aliĝinto de la UK aŭ individua membro de UEA. Li estas: S-ro Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey, Britujo.

Pri Internacia Somera Universitato

La nombro de personoj prelegkompetentaj en la Internacia Somera Universitato estas jam tiel granda, ke nur publika alvoko havas ŝancon atingi ĉiujn. Kiu deziras proponi sin kiel preleganton por la venonta sesio de ISU en Kopenhago, bonvolu sin turni rekte al la nova aganta sekretario de ISU: Prof. Jonathan Pool, Department of Psychology, McGill University, P. O. Box 6070, Station "A", Montreal, Quebec H3C 3G1, Kanado

Denove favoraj kondiĉoj por tiuj kun "problemoj"

Kiel (unufoje) por la pasinta UK, ankaŭ por Kopenhago ekzistas specialaj kondiĉoj por personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj. Kiu ne povas anticipi transpago la kongreskotizon al Rotterdam aŭ al sia landa kongresa peranto, aŭ kiu ne povas esti ĝustatempe certa pri ricevo de pasporto, tiu rajtas sendi la aliĝilon sen la samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam, kune kun klariga letereto. Tiaj personoj ne estos jam rigardataj kiel aliĝintoj, sed ili havos la rajton aliĝi tuj post alveno en Kopenhago, pagante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo.

Literatura Suplemento de "Heroldo"

Bruselo. (pp) Jus aperis la Literatura Suplemento de "Heroldo de Esperanto", la duonmonata grandformata sendependa Esperanto-gazeto, kiu aperadas jam de 1920.

La Suplemento enhavas tradukojn el la araba, hebrea, hispana, itala, nederlanda, rusa kaj ukraina literaturoj, krom originalaj prozaĵoj kaj poemoj.

Aparte interesa estas fragmento el la romano de Guareschi "Don Kamilo", (filmita kun Fernandel en la ĉefa rolo), kiu unufoje aperas tradukita en Esperanto.

Senpaga provekzemplero de "Heroldo de Esperanto" estas ricevebla ĉe: Heroldo de Esperanto, Rue de la ReINETTE 13, Pippelingstraat B-1000 Bruselo.

JUS APERIS la dua
eldono de la jam
(fi)fama anekdotaro de
Louis Beaucaire

KRUKO
KAJ BANIKO
EL BERVALO.

Kun la subtitolo
"Maldecaj anekdotoj
por neprudaj legantoj",
tiu vikle ilustrita
originala ridincitilo tiel
furoris tra la mondo, ke la unua eldono
el 1970 jam post nuraj ses monatoj estis
havebla nur prunte aŭ ŝtele. Simila sorto
versajne atendas ankaŭ la duan, korektitan
eldonon. La prezo, malgraŭ la galopa
inflacio, restis pli modesta ol la enhavo.

Amplekso: 143p. + 13 bildopaĝoj.
Formato: DIN A5. Broŝurita kaj

Prezo 16,90 DM/GM

*Kunko kaj Baulko
et Bernalo*



La legolibro, kiun ni plej bezonis



Novspeca
legolibro en-
havanta 20
dialogojn kun
2000 konversa-
ciaj frazoj, parol-
turnoj, demandoj
kaj respondoj kaj
kun 20 tutpaĝaj
humuraj ilustraĵoj.
La tekstoj estas laŭ-
grade aranĝitaj.



Verkita en
simpla stilo
por faciligi al
novaj lern-
antoj paroli
la Inter-
nacion
Lingvon

141 pj.
Poŝform-
ata (22 x
12 cm)

Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Artoll. Eldonis:
Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo 4,90 DM/GM

Mendu tuj ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, D-85 Nürnberg 1,
Postfach 2113, PSchK Nürnberg 819 56-851 - Stadtparkasse
Nürnberg 1.901.579

Esperanto en la radio

El Varsovio aŭdiĝis kelkaj vere interesaj novaĵoj:

Pollando - nombroj kaj faktoj

tiu broŝuro, antaŭanoncita jam antaŭ kelka tempo, nun aperis kaj
estas havebla. La E-tradukon prizorgis redaktoro Jerzy Grum, kiu
verkis ankaŭ la ĉapitron pri Esperanto en Pollando. La Esperanto-
redakcio de Pola Radio disponas pri kelkcentoj da ekzempleroj de
tiu broŝuro. Mendu tuj ĉe Pola Radio, Esperanto-redakcio, P.O. Box 46,
PL-00-950 Warszawa 1, Pollando.

Kiom da membroj havas Pola Esperanto-Asocio? Respondon oni povis
aŭdi en la ĉiusemajna rubriko "El la vivo de PEA". Laŭ ĝi PEA nun
havas ĉ. 4 500 membrojn, sed oni taksas laŭ la venditaj lerniloj,
ke minimume 80 000 personoj en Pollando sin okupas pri Esperanto.
Tre populara en Pollando estas la korespondaj kursoj de PEA, kiun
partoprenas miloj da homoj.

Kiel konate LOT, la pola flugkompanio, pli kaj pli aplikas Esperanton.
Al LOT estis dediĉita la lastdیمانĉa Esperanto-Ekspreso, tamen mi
sentis en tiu Ekspreso la mankon de informoj el la internacia Esperan-
to-movado.

La konkurso de PR pri LOT oni povas ankoraŭ partopreni ĝis la
15 de novembro 1974. Oni devas respondi al jenaj demandoj:

- 1) Kiuj urboj en via lando havas senparan aertrafikan kunligon kun Varsovio? Kiuj flugkompanioj priservas tiujn ĉi kunligojn, bonvolu menci i liajn nomojn.
- 2) Ĉu vi volus fari ekskurson al Pollando? Se jes, kiun trakon en Pollando vi elektus plej volonte kaj kial? Kiun regionon, lokon, vi volus viziti kaj kial?
- 3) Kiajn impresojn vi elportis el la lasta estado en Pollando?